


BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

AÑO VII

N.º 7 (79)

JULIO, 1955



G I J Ó N

Quando este número de nuestro «Boletín» llegue a manos de nuestros lectores, el esperantismo español habrá llegado a un estado de efervescencia, cuya periodicidad recae este año en la simpática ciudad asturiana.

Pocas veces, en el curso de nuestra breve, pero activa acción por el idioma internacional, habremos sentido la seguridad del éxito como en la presente ocasión, cuando ya tocamos con la mano la realidad del XVI Congreso Español de Esperanto. Y esa seguridad, que es fruto de la confianza que tenemos en la capacidad y entusiasmo de los esperantistas gijoneses, que se han prodigado hasta el grado superlativo, para ofrecernos, como ellos han dicho, el mejor congreso, se basa también en la magnífica actitud de las dignas Autoridades asturianas, que han dispensado sus mejores disposiciones para que el congreso

16-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

23 - 27 de Julio de 1955

Adreso de la Organiza Komitato: Grupo Esperantista del Centro Asturiano
Paseo de Begaña, 26-28, GIJON, Asturias

La Komitato sendis al ĉiuj kongres-aligintoj kongres-afiŝon, hispanlingvan turisman broŝuron pri la urbo kaj ankaŭ esperantlingvan ĵus eldonitan perspekton pri Gijón.

La Provincestra Moŝto estos la Honora Protektanto de la Kongreso, kaj li fermos ĝin per parolado en la Universitato de Oviedo. Novaj aranĝoj ne antaŭe anoncitaj estas mara promenado kaj adiaŭa festo en Ribadesella.

Ce alveno oni estos informataj pri la definitiva kongresprogramo.

HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Oficialaj komunikoj

Aunque habíamos anunciado que enviaríamos el número de Junio contra reembolso del importe de la cuota de este año a aquellos miembros que todavía no la han hecho efectiva, se ha tenido que aplazar a causa de un exceso de trabajo de nuestro secretario. Por otra parte, como el sistema de cobro por este procedimiento requiere bastante trabajo, agradeceríamos a nuestros miembros tuvieran la amabilidad de remitirnos sus cuotas por giro postal. Sin embargo, a aquellos que no lo hagan les expediremos contra reembolso el número extraordinario del Congreso. Confiamos en la comprensión de nuestros socios para que procurando aliviar el trabajo de nuestro secretario procedan a mandar el importe de sus cuotas. También debemos advertir que, en el cobro a reembolso, dichas cuotas serán incrementadas con el importe de los gastos.

La dirección antigua de nuestra Federación, Ruzafa 7, ya no es válida. Rogamos se nos dirija la correspondencia y giros a Pelayo 7, Valencia. Los envíos de dinero, a nombre de Ernesto Hurtado.

tenga el brillo y esplendor que merece. Tanto los organizadores como las Autoridades han puesto de su parte cuanto de ellos podía esperarse. Para que la partida quede igualada, precisa que los esperantistas españoles contribuyan con su presencia, para que el número de congresistas no quede por debajo de la importancia de nuestra reunión anual, sacrificando recursos, tiempo e intereses particulares en aras de la seriedad e importancia del acontecimiento.

Tenemos la seguridad de que tanto los actos oficiales como las sesiones laborales y las múltiples distracciones ofrecidas por los organizadores serán recordados durante muchos años por cuantos tengan la suerte y la voluntad de asistir al congreso de Gijón. Y que este nombre será, de hoy en adelante, para los esperantistas españoles, no solamente el recuerdo de una bella ciudad situada en una maravillosa región, sino también el símbolo de una feliz conjunción de simpatía, hospitalidad y trabajo, que habrá servido de notable jalón en la progresiva evolución del Esperanto en España.

Así pues, a Gijón, con alegre voluntad de trabajo y con espíritu de fraterna colaboración con los laboriosos esperantistas asturianos.

(Nuestra foto muestra el santuario de Covadonga, a visitar en la excursión oficial).

NOVAJ LIBROJ

Recenzistoj esprimas ĉi tie siajn proprajn juĝojn pri verkoj.

La Redakcio kaj la Estraro de HEF estas tute sendependaj de iliaj opinioj.

SENNACIECA REVUO 1955 — Kvara post-milita kajero. Formato 22 x 18 cm. 56 paĝoj, pluraj el ili kun ilustraĵoj. Prezo: 20 pesetoj. Akirebla ĉe Libro-Servó de Hispana Federacio.

Plia numero, kun verda koloro en la kovrilo, riĉigas la kolekton de la interesa revuo, kiun S. A. T. aperigas ĉiujare, kiel sintezon de siaj popolklerigaj principoj.

Tre varia kaj tre valora estas la enhavo. Jen kelkaj notoj, per rapidaj trajtoj, por iom skizi ĝian konsiston: N. Barthelmess, en rememoriga artikolo pri Lanti, malkovras al scivolema publiko la pensojn kaj sentojn de la fama *herezulo* en liaj lastaj jaroj, kiam ankoraŭ flagris la milito kaj, pro tio, preskaŭ sole en meksika gazeto li povis laŭtigi siajn pikajn vortojn. Kelkaj el ili, tamen, pri unuiga politika procedo en Eŭropo, dum tiu lia lasta vivperiodo, starigis enigmon kaj vekis fortan miron, eĉ al tiuj jam kutimiĝintaj al liaj sprite kaj lerte sagacaj ruzaĵ parolturnoj.

Profesoro Waringhien funde sed facilmaniere lekeias pri temo preskaŭ halucinacia: «La Magio hieraŭ kaj hodiaŭ». Majstre li klarigas la pezan influon de ritoj kaj misteroj en la homa karaktero. Laŭ tio, eĉ en nia fanfaronanta epoko, plej simplaj individuaj agoj aŭ plej gravaj ŝtataj decidoj okazas ankoraŭ sub la premo de treniĝantaj pratempaj superstiĉoj.

Agrabla kaj instrua estas la priskribo «Fizionomio de Maroko» kiu montras kaŝitajn aspektojn kaj liveras pensigajn informojn pri tiu aktualiginta lando el norda Afriko, la kontinento, kiu vekigis... «Virinlaboro en Aŭstralio» estas ne ja seka fakartikolo, sed sukplena raporto pri vivaj problemoj de la virinlaboro, kiu daŭre plimultiĝas en la nuntempa socio.

«Kulturo, klereco kaj mensa edukado» aperas kiel skriba postsigno de interesa prelego, kun klaraj konceptoj pri signifa kaj rolo de la tri formuloj el la titolo.

Sekvas vigla kroniko: «Iom pri Usono»; per stilo de moderna ĵurnalisto, ĝia aŭtoro ne nur iom, sed multe kaj multe, rakontas

pri Usono; tial, ĉiu, kiu ŝatas objektivite studi la faktorojn, kiuj de interne gvidas la agmetodojn de la grandaj ŝtatoj, certe ĉerpos el ĉi tiu raporto utilan materialon. «La judoj en Ĉinio» estas plaĉa kaj agrabla artikolo pri la longa tiea restado — dum miloj da jaroj! — de multe da judoj, kiuj, dank' al la tradicia toleremo de la malnova Ĉinio, tie kunfandiĝis kaj perdis volonte siajn specifajn morojn; ĉar tion, kion en aliaj mondpartoj ne sukcesis fari miljaraj persekutoj, realigis filantropa filozofio. «Tekniko kaj kulturo en Moderna Civilizacio» — kial ne Civilizo? — estas flua traduko de scienca parolado pri ekonomio, sociologio kaj politiko, fare de franca profesoro, kiu — se ne prolettendeca, kiel diras la tradukinto — ekzakte scias pri kio li parolas. Tial, do, jen bona mentoro por sciema homo, kiu ŝatas mem juĝi.

D-ro Paul Neergaard, tiel kompetenta pri botaniko, kiel pri afableco, plaĉe distras kaj instruas en ripoziga temo: «Kiel la sciencistoj donas nomojn al la plantoj?» Sekvante saman linion, nia bona amiko J. Régulo Pérez, en tre dokumentita artikolo «Mito kaj Scienco pri Atlantiso», transportas la leganton en la fantazian mondon de la mistera insulego pri kies iama ekzisto, tiom larĝe oni diskutis. Treege kuriozaj estas la du mapoj, kiuj ilustras la logan kontribuojn de nia klera samlandano, kiu ĉiam trovas la manieron plekti sian prozon per originala stilo, ofte iomete ŝoka, kun la pipro de kelkaj vortetoj aŭ formoj juke uzitaj. Nun kaptiolas dufoje la radiko *far'*, tiel, kun apostrofo inter substantivo kaj prepozicio: *Mapo far' de la napoleona kuracisto*... Multe mi devis cerbuni por fine deĉifri la signifon: Temas ja pri simpla sed ege malsimple aplikita elizio; ĉar, eĉ sen tio, la frazo restas konfuza; jen: *Mapo, fero de la*... Por ke la senco iĝu komprenebla al ĉiu normala esperantisto, krom tio meti komon post la vorto *Mapo*, nepre oni devas iom ŝanĝi la tekston, tiel: *Mapo farita de*... aŭ: *Mapo, kiun faris*... aŭ,

konservante la saman stilon: Mapo, *verko* de... Jes, mi miras, ke tiel estimata akademiano obstine uzas sian talenton en tiuj ekzercoj, kiuj aspektas ŝaradoj, ekster la sfinksa angulo ĉe la kutima paĝo de gazeto por diversajtoj... Cetere, ankaŭ mi miras antaŭ la evidenta paradokso, ke tiaj provoj aŭ kabinetaj intelektaĵoj ĝuste trovas azilon en laborista eldonajaĵo!...

D-ro Kurt Dellian en «Principo de Terminara Kreado» prezentas pure sciencaan studon, kiu pledas por «komune starigitaj principoj por la farado de fakaj terminaroj». Literatura fragmento «La marionetoj dancas...» kaj froŝa bukedo da belaj poemoj ideale kompletigas la riĉan paradon, kies plej rimarkindajn detalojn mi prezentis al vi, ŝajne pli kiel ĉiĉerono ol kiel recenzisto... se oni ne kalkulas en la konto la kritiketojn al la tikla *far'* de nia amiko J. Régulo kaj lasthoran aludon al la fuŝa maniero skribi la nomon de hispana popoloa poeto, kiu, fronte de poemo vigla kaj verva, dediĉita al lia memoro, erare jene aspektas: Gracia Lorca, anstataŭ la korekta formo: García Lorea.

Nu, resume jam, post varma rekomendo tuj akiri kaj atente legi, de komenco ĝis fino, la tutan kajeron, kies enhavo utilos al ĉiuj senescepte, eĉ al kiu ajn komprenema kontraŭulo de esprimitaj opinioj, estu broĉo de mia kroniko-recenzo la saĝaj vortoj, kiuj simpatie troviĝas en unu el la antaŭparoloj: Ekkoni, primediti kaj pridiskuti argumentojn de klera malsamopinianto pli utilas ol ĉiama relegado de parkere konataj propaĝandajaĵoj.

Luis Hernández.

EL LA MANIKO. Reto Rossetti. Novelaro. — «Stafeto», Bel-literatura Eldon-serio, núm. 3. — J. Régulo, eldonisto. — La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1955. 224 paĝoj. Prezo: 65 pesetoj.

Tri jarojn post la malgranda poemaro *Oazo* en *Kvaropo*, ni finfine povas posedi tutan libron, novelaron de la multtalenta, sprita kaj mirinde verva Reto Rossetti. La plimulto jam aperis, antaŭ kelkaj jaroj, en «Literatura Mondo», sed kelkaj estas absolute novaj, inkluzive brilegan eseon pri Esperantaj vortludoj.

Mi opinias, ke ĉi tiu libro rapide iĝos konata klasikaĵo. Kial? — Ne, fakte, pro la ideoj; S-ro Rossetti havas malpli origi-

nalan kaj potencajn menson ol Kalocsay aŭ William Auld; sed en *El la maniko* li donas grandskalan pruvon pri la nuanceriĉeco, la trafeco, la larĝeco kaj precipe la normaleco de Esperanto kiel vivanta lingvo. Misfiaĉulo en Montevideo diris, ke Esperanto taŭgas nur por menuoj; ni povus ĵeti al lia nazo nur kelkajn frazojn de Rossetti — tiajn ekzemple —: «Senpeze ili sursaltis la biciklojn kaj sagis antaŭen, remigre al la hejma regiono»; «Mi ofendis vin apogee»; «La obstina herbo per diskreska reto fikso-tenis la sablan teron»; «Io trafulmas min»; «Certe kiel amen en proĝo»... S-ro Rossetti havas stilon eble tro forte individuan por esti vere modela, en la senco, ke oni konsilu ĉiujn imiti ĝin; sed li mirinde montras la kapablojn de nia lingvo. Li amas vortojn, kaj elektas ilin ĉiam zorge.

Post la vere majstra regado de la lingvo por tre diversaj celoj, la du plej interesaj kvalitoj de ĉi tiu libro estas la natureca prezentado de ĉiutaga konversacio (oni ja povus verki tutan eseon pri la interjekcioj de nia aŭtoro) kaj la psikologia observemo, precipe pri junuloj. S-ro Rossetti rigardas seksrevemajn virgulojn, solecajn strangulojn, fuŝulojn kaj la viktimojn de obsedoj kun ironia kompatato, dolĉamara komprenemo. Li tiel bildigas ilin, ke ili ŝajnas vivi antaŭ ni. Por mi la plej belaj floroj en la nuna luksa bukedo, krom la du konsterne brilaj vortludaroj, kiuj laŭtridigis min en trajno, je la miro de najbarino, estas *Banu vin, mia bela*; *La taglibro de Aleksandro Zoffany*; *La krutaĵo* kaj *La kaprica kadavro*, pro la psikologia percepto kaj intereso.

Tio kondukas min al mia sola protesto kontraŭ libro, kiun mi vere tre frandis. Ĝi estas tiel bona, ke mi bedaŭras — ke ĝi ne estas tiel bona libro, kiel S-ro Rossetti kapablas verki. Li verkis la plimulton antaŭ 6-10 jaroj. Li nun verkas relative malabunde; sed nun, eĉ pli sperta, se eble, pri la lingvo; multe pli matura post plenkrena vivo persona, esperantista kaj profesia — li povus verki por ni la plej elstaran psikologian romanon, aŭ novelaron, de nia literaturo. Tion li eble neniam trovos la tempon fari; sed la nuna bonega libro ne devas esti lia apogeo. *El la maniko* de Reto Rossetti, la vortjonglisto, venis impona aĵaro; sed mi kredas, post tia promeso, ke lia plej elstara verko restas ankoraŭ en la maniko. Skuu vin denove, Sinjoro Rossetti!

Marjorie Boulton.

MOYÁ (Barcelona). Okazis la anoncita festo pri la kursofino de la Esperanto-Grupo. Partoprenis 250 personoj de Barcelona, Sabadell, Tarrasa, Santa Coloma de Gramanet, Vich, Manresa, Manlleu, Taradell, San Feliu de Codinas ktp. Oni vizitis la lokajn vidindaĵojn: Muzeo, Parohpreĝejo, Parko ktp. Oni trinkis honoran vermuton en Gran Hotel Moyá kaj fariĝis la festo, en kiu paroladis F-ino Durenkamp (redaktorino de «Espero Katolika»), mirinde diris poemojn S-ro F. Vilá, kaj S-ro Mariano Solá prononcis la finajn



vortojn. La enkondukon faris S-ro Ramón Molera. La Stelo-orkestro ludis la himnon. S-anoj de la loka grupo Rosina Armengol kaj Nuri Fonts deklamis, la unua la poemon «La Vojo» kaj la dua katalunglinvan tradukon de «La Espero» (traduko verkita de S-ano Samuel Roca Rodó). Ĉirkaŭ 60 leterojn ricevitaj ĉe la Letervespero, oni distribuis inter la 25 lernantoj de la kursoj. Kiel anoncite ankaŭ okazis tagmanĝo en la Gran Hotel kaj vizito al la monaĥejo Santa Maria de l' Estany.

EIBAR. La esperantistaro de Bilbao kaj San Sebastián ekskursis al ĉi tiu urbo 29/5 por viziti la lokan samideanaron, kiu sub la gvido de S-ano Santiago Arizmendi klopodas por atingi fortan grupon. Ĉiuj kune supreniris al la monto Arrate en kies supro staras la preĝejo Sankta Virgulino de Arrate. Dum la meso, amatora orgenisto ludis belegajn komponaĵojn. Sub la ombro de korpulentaj fagoj la samideanaro tagmanĝis kaj kiel kutime oni kantadis kaj babilis. Reveninte al Eibar oni vizitis la Virinan Asocion, afable invitataj de ĝia gvidantino Mercedes Careaga, kiu regalas tre malavare la vizitantojn. Blinda samideano José Luis Alvarez, el San Sebastián, bone ludis per la piano hispanajn dancojn, de Granados. La ekskurso de la esperantistoj de Bilbao kaj San Sebastian estis tre kuraĝiga por la lernantaro de Eibar; ĉi tio estis la precipa atingiĝo de tiu agrabla vizito.

BILBAO. La loka klubo anoncis sian intencan, ke la klubo ĥoro gravuru magnetonan rubandon. Ĉu ĝi preparas al ni agrablan surprizon en Gijón? Rilate la vojaĝon al nia Nacia Kongreso, oni anoncis ke ĉiuj sidlokoj en la aŭtobuso estas jam antaŭmenditaj. Kaj ankaŭ rilate tiun partoprenon en la Kongreso, la klubo aranĝis mallongan konversacian Esperanto-kurson por la kongresantoj. Estas tre interese konigi ke la ĉi tieaj samideanoj kutimas fari ĉiudimane matene promenadojn, en kiuj ili konversacias nur en Esperanto.

RAPORTO DE LA ESTRARO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO PRI LA LABORPERIODO JULIO 1954 - JUNIO 1955

Estimataj geamikoj:

Kiel kutima regulo kaj agrabla devo, ni raportas pri la ĝenerala agado de nia Federacio dum la daŭro de la lasta laborjaro. Ĉar ni konsideras, ke ne estas necese ripeti multajn vortojn el la pasintjara raporto, la nuna estas tre mallonga, tial ke preskaŭ en sama formo aŭ simila maniero disvolvigis la asociaj aferoj pri kiuj zorgas kaj respondecas la samaj personoj. Tio koncernas la funkciadon de la ĉefaj fakoj: Bulteno, Libro-Servo, Gazetara Servo, Informa Servo kaj Koresponda Kurso.

Rilate la sekciojn, ni povas informi, ke fondiĝis kaj funkcias la filatela, la instruista kaj la fervojista, kies komunikoj oportune aperis en la Bulteno. El ĉi tiuj novaj branĉoj, la filatela plej aktive montras sian ekziston. Ĝi partoprenis jam en kelkaj ekspozicioj kaj trafeprevis al la vasta amaso de la poŝtmarkkolektantoj la utilajn ŝancojn kaj efektivaĵojn, kiujn Esperanto havigas al ĉiuj adeptoj de tiel populara inklino.

La Estraro renoviĝis sekve de la statuta baloto okazinta fine de 1954. Sed, tial ke la novaj estraranoj ricevis la aŭtoritatan aprobon nur antaŭ nelonge, fakte ili ĵus ekpostenis. Oni povas diri do, ke ili nun komencas plenumi sian gvidan rolon.

Bedaŭrinde, la membraro de nia Federacio ne kreskas. Fine de 1954 la nombro estis 550 pagintaj membroj. Antaŭ la stato de ĉi tiu fundamenta apogo, ni dubas nun—meze de la jaro— ĉu ni konservos tiun nombron ĝis Decembro; tute nekomprenible, granda kvanto da federacianoj ankoraŭ ne pagi sian kotizon. Ĉu ili perdis varmon aŭ fervoron por Esperanto?, ĉu ili havas plendojn kontraŭ ia flanko de nia agado?, ĉu ili ne povas elspezi la modestan sumon, kiu konsistigas la kotizon por tuta kompleta jaro? Pri la unua punkto, ni ne povas kredi ke Esperanto perdis intereson por ili, ĉar daŭraj kaj rektaj rilatoj donis al ni okazon scii, kiel funde enradikigita estas nia lingva idealo en la hispana esperantistaro. Pri la tria demando, tute sincere ni rajtas kredi, ke la nuna kotizo ne estas financa baro eĉ por plej modesta samideano, ĉar oni ĝin povas pagi, laŭ prefero aŭ konveneco, per pluraj apartaj partoj; cetero, nia ordinara kotizo ne postulas pli da mono ol unufoja ĉeesto de familio al tute simpla spektaklo. Tial, do, venas al ni la dubo ĉu kontraŭvolaj eraroj niaj en la gvidado malkontentigas kaj sekve forigas de ni atentindan parton de nia membraro. Tio estus treege danĝera simptomo de socia malsano, kiun nepre oni devas kuraci. Kiel ofte dirite, sur jam longa vojo, ni estas ĉiam pretaj aŭskulti ne nur laŭdojn sed ankaŭ plendojn, kritikojn, sugestojn eĉ riproĉojn, se trafte fundamentitajn. Tamen, neniom da tio ni ricevis... Sed evidenta fakto estas, ke la vivanta kerno de nia Federacio, anstataŭ larĝe, kreski, videble kaj danĝere malkreskas...

La Kongreso devas malfermi ampleksan debaton pri ĉi tiu gravega kaj urĝa temo, por serĉi la kaŭzojn de tia sinteno kaj trovi solvojn al la problemoj, kio ebligos pli regulan marŝon de la hispana esperantismo, kiu, en multaj urboj, estas vigla kaj modela. Tio pravigas nian aserton, ke la sorto de nia Federacio dependas de la vivo de la kluboj; ili estas la plej fidindaj kolonoj por nia nacia konstruaĵo, fortika domo en aktiva rolo kaj vigla svarmo de centra oficejoj por ĉiel defendi la superaĵojn de la Internacia Lingvo en nia lando, tra ĉiuj ĝiaj regionoj.

La Estraro zorge kaj diligente sekvis la instrukciojn de nia internacia organizo U. E. A. rilate la aferon pri UNESKO. Ni helpis la monkoklekton por la «Fondaĵo Montevideo», kio ebligis rektan partoprenon de sendito de U. E. A. en la fama Konferenco de UNESKO, kie nia Movado gajnis valoran pozicion, kiu, kvankam simpla deirpunkto, se lerte kaj saĝe utiligata, faciligos la laboron por novaj pli arogaj celoj. Ni ĝojas, ke niaj klopodoj ĉe la hispana komisiono por UNESKO ŝajne iel kontribuis al la pozitiva rezultato atingita en Montevideo, la bela urugvajna ĉefurbo.

Jen plian foron aperas en la jara raporto la demando pri la hispana-esperanta vortaro. Ni povas informi nun, ke tiu ellaborata de S-ro Tudela kaj aliaj valenciaj kunlaborantoj troviĝas preta por fina superrigardo antaŭ ol liveri la manuskripton al la linotipisto. Laŭ nia scio, grupo da valenciaj samideanoj intencas fari la eldonon private, sub siaj propraj zorgoj. Ankaŭ, iom pli malprecize, ni scias, ke en Barcelono alia grupeto da bonvoluloj studas la manieron reldoni malnovan vortaron kun aldono de la plej necesaj novaj radikoj. Ankoraŭ ne estas decidite ĉu la elektita vortaro, kiun oni reldonos estas tiu de Inglada aŭ tiu de Pujulá-Vallés. Tamen la intenco de niaj katalunaj samideanoj estas havi urĝe iun vortaron; ĉi tiu reldono antaŭ fariĝus kiel afero privata de tiu kataluna grupo. De sur nia oficiala podio ni varme stimulas kaj rekomendas tiaspacajn klopodojn, kiuj nur bonon portos al la praktika instruado de Esperanto en nia lando, ĝis venos la tago, kiam estos preta la ampleksa vortaro, kiel oficiala entrepreno pri kiu laboradas en Sabadell la teknika komisiono elektita en la Valencia Kongreso de 1952.

Kaj jam ĉe la fino, ni devas atentigi vin pri tio, kion ni diris pasintan jaron rilate la translokigon de nia Federacio al Madrido, kie pli proksime de la centraj ŝtataj instancoj, novaj estraranoj kun freŝaj fortoj povos pli sukcese gvidi la Federacion al ĝiaj finaj celoj; tamen, ankaŭ estas devo nia averti, ke la tasko ne estas facila. Por trafe ĝin plenumi estas necesa granda dozo da sindonemo kaj bona vole, krom minimuma kvanto— sed efektiva!— da sperto kaj kompetenteco. En la nuntempa etapo de la esperantismo ne ekzistas multaj —nek malmultaj!— ŝancoj por materiaj profitoj aŭ por honoriga elmontriĝemo. Estas tempo nur por silenta kaj senhalta laborado, zorgante kontentigi ĉiujn flankojn de multflanka membraro per objektiva sed rigora obeo al la spirito kaj al la teksto de nia statuto. En tia direkto, la madrida rondo devas sin prepari por esti nia pulsanta centro, ne ja nur pro tio, ke ĝi troviĝas en Madrido, sed ankaŭ pro tio ke ĝi deziras porti kun fervoro kaj sindonemo la pezan respondecon, kiun postulas nun nia Movado. Ĝis tiu momento, Valencio firme tenos ankoraŭ, malgraŭ la natura laciĝo, la direktilon de la Hispana Esperanto-Federacio, je kies nomo vin salutas

La Prezidanto, D-ro Rafael Herrero.

La Sekretario, Ernesto Hurtado.

La Manresa Katolika Esperantistaro sin manifestas en Religia Procesio



Unu el la plej fervoraj manifestacioj por rememorigi la pasionon de Jezuo, dum la Sankta Semajno, ek de la XVI-a jarcento en Hispanujo estas la solenaj procesioj sur la stratoj de la urboj. Ili navas gravan karakteron, ĉar la plejmultaj el la partoprenantoj plenumas piajn promesojn, kelkaj eĉ iras piednudaj kaj aliaj trenas longajn ĉenojn ligitajn ĉirkaŭ siaj zonoj. Ili vestiĝas per ampleksaj kaj longaj tunikoj kaj altaj kapuĉoj konusformaj kovrantaj la vizaĝon, tiaj ke oni ne scias ĉu temas pri viro

aŭ virino. Dum la solena irado, estas montrataj ĉiuj objektoj per kiuj oni suferigis nian Savinton kaj naturgrandaj homaj figuroj portataj sur plantajoj, reprezentantaj liajn suferadojn. Tiujn plastikajn elmontrojn akompanas profesiaj kaj metiaj gildoj, kies vestoj diferencigas laŭkoloro unuj de la aliaj. Tiun ĉi jaron la Manresa katolika esperantistaro partoprenis en la procesio okazinta en nia urbo dum la Sankta Vendredo. Kiel niaj legantoj povas rimarki sur la apuda foto, ili montris sur siaj brustoj la verdan stelon kun blanka kruco en ĝia mezo. Manresa fieras pri la posedo de vera dorno el la krono de Jezuo, kiu relikvo sub baldakeno kutime prezidas la procesion.—*Angel Llobet, Manresa*

LAŬTPAROLILO DE LA ESPERANTISTARO

Opinioj, sugestoj kaj kritikoj de la legantoj

PRI VORTOJ EN ESPERANTO

La verva atako de S-ano Broadribb en n.^o 4/55 de *Boletín* kontraŭ tiuj, kiuj deziras la ĉiamecon de populara ne de preskaŭ nur sciencista Esperanto laŭ la misinklino de Hidistoj, min mirigis ĉagrene. Ĉu la tro ofte vokata paraĝafo 15 de nia Fundamento permesas, ke nia internacia lingvo, destinita por la *tuta* homaro kaj unuavice por la vasta publiko pro idealismaj celoj, ne por klano de malmulta, kiuj ofte iradas per irstandoj akiritaj dum plurjara pli malpli peniga lernado de okcidenteŭropaj lingvoj, ke Esperanto estu daŭre fuŝata per simpla transskribado de latinidaj esprimoj? Ĉar tro multe da tiaj homoj estas tro malhumilaj kaj malstreĉemaj por ekipi la loĝantaron de la nova mondo universala per *universala* lingvo, kiun la homaro jam nun bezonas, por pli bone kaj pli rapide evolui. S-ano B. provu libere paroladi en kunveno de kiu ajn E-klubo. Li tuj konstatos, ke uzante la liberecon de la Suplemento, li parolas preskaŭ fremdan lingvon.

Tiel uzate la Suplemento (ankaŭ necesesa esprimo en E.) estas pli danĝero ol merito. Mi estas ankaŭ nur preta, rigardi ĝin kiel magazenen de fruktoj de kvazaŭ-Esperanto kaj substrekas denove mian ĉiaman postulon, ke ĝuste la kleruloj en niaj vicoj havu la senkroman fervoron, montri al la simplaj gesamideanoj, kiuj anstataŭ studadi je malpropraj kostoj devas perlabori la panon ĉiutagan, kiel oni pliriĉigas la vortaron de E. —jes, vortaro malgraŭ via propono pri ĝia anstataŭigo, S-ro Broadribb— el ĝiaj propraj elementoj kaj kiel oni komprenige traduku la prenitajojn el la studitaj fremdlingvoj.

La pigmea riproĉo kontraŭ la asertita *kaprico* de nia ne imitebla Majstro kolerigas ĉiun vere sindonan esperantiston kaj estas vera bumerango —jen esprimo ne tradukebla— por lia malfrua kritikinto. Kontraŭ tia insulto mi protestas kaj scias la aprobon de ĉiuj, kiuj komprenas la destinon de Esperanto, esti ligilo inter la diverspopolaj

amasoj de la homaro, kiujn bezonas la paco de la mondo.

S-ano B. memoru, ke la homaro konsistas ne nur el angloj, francoj, hispanoj ktp. Li ankaŭ pripensu, ke Esperanto fariĝus nekomprenebla ankaŭ per cetero necbla fikso de ĉia nuanco de pensoj kaj sentoj per po unu sola esprimo. Tiel fariĝis pri ĉiu ellaborita lingvo moderna, kiu estas plene komprenebla eĉ ne por ĉiuj siaj plej eruditaj lingvanoj.

Por helpi al S-ano B. mi varme rekomendas al li kaj al liaj samuloj, humile kaj prudente legadi la verkojn de Zamenhof, Kabe, Grabowski k. a., atentante la pravegan verdikton de la kompilinto de la grandioza *Kataluna Antologio*, Jaume Grau Casas, bedaŭrindege jam mortinta, en la ĵus citita verko:

«Ni forte evitis neologismojn, novajn afiksojn kaj ĝenerale ĉiajn novaĵojn proponatajn de reformemuloj. Ni sincere kredas, ke la Fundamenta Esperanto jam posedas tian kolosan riĉecon, ke al *talentu uzanto* de la lingvo estas nenecese *ĉerpi el aliaj fontoj*. Tiuj, kiuj trovas grandajn mankojn en nia lingvo, plej ofte montras nur proprajn mankojn; manko de studo, manko de praktiko, manko de talento...»

Jen ankaŭ ne nur mia konvinko kaj programo nepre sekvinda kaj sekvenda. Cetero estas pripensinde, ke lingvo ne estas matematiko. Ĝia ĉefo estas ne la cerbo, sed la koro, kies stabestro estas la cerbo. Tial la abundeco de la vivo parolata, kiun montras precipe la virinoj, la diversegaj floroj en la koruptita paradizo sur la tero. Se nia internacia lingvo estus lau la ĉi tie konfesita gusto de S-ano B., Rajmondo Senwartz kun sia anagramatiko ne ekzistus; same ne aliaj sprituloj per nia lingvo. Esperanto fariĝus simpla kodo ĉiam pli ampleksa kaj postulanta la tutan tempon eĉ de specialstoj. Tia internacia lingvo estus malakceptinda, ankaŭ se ĝi nomiĝus plue Esperanto.

D-ro A. Halbedl, Aŭstrujo.

DIVERSAĴOJ

Ĉiu membro de nia Federacio aŭ abonanto de nia bulteno, sendinta solvon de enigmo, gajnos unu poenton. Gajnintoj de 10 poentoj ricevos libropremion. Ni akceptos solvojn ĝis la 1-a de Aŭgusto.

Jenaj samideanoj sendis al ni la korektan solvon de la enigmo n.º 18: A. Candela, E. Miralles, M. Fernández Méndez, J. A. Daniel, P. Naranjo, S. Roca, V. Monsalve, R. Albero, A. Núñez Dubús, M. Pilloy kaj A. García Gómez.

SOLVO DE LA ENIGMO N.º 18

Horizontale: 1 Knab, orig. 2 Komprenetis. 3 In, rukul, nu. 4 Odi, ist, sed. 5 Munt, teko. 6 Konsidero. 7 Otrama. 8 Lod, ilo, for. 9 Er, anobi, ge. 10. Kosmografio. 11 Jaid, alio.

Vertikale: 1 Kiom, olek. 2 Konduktoroj. 3 Nm, inord, sa. 4 Apr, tna, ami. 5 Brui, inod. 6 Eksbiolog. 7 Onut, obra. 8 Rel, tem, ial. 9 It, seraf, fi. 10 Ginekologio. 11 Sudo, areo.

ENIGMO N.º 21

Aldonu literon, de J. Devis.

Post ĉiu numero estas donitaj du klarigoj, respondantaj al serĉotaj vortoj, el kiuj la duan oni trovas aldonante literon antaŭ aŭ inter la literojn de la unua vorto. La aldonitaj literoj, legataj en la sama sinsekvo, formas *proverbon*.

1 Loĝejo por brutoj. Plataj objektoj metitaj unuj sur aliaj. 2 Malmola elstarajo ĉe kapo. Sankta libro. 3 Kuirvazo. Rivera interkomunikilo. 4 Diptero. Korpa organo. 5 Haŭta malmolaĵo. Ŝnurego. 6 Manĝebla riverfiŝo. Artefarita hararo. 7 Naĝbarelo. Parto de la kapo. 8 Perforte ŝteli. Furiozega malsano. 9 Strata malparaĵo. Komerca skriba kalkulo pri havoj aŭ ŝuldoj. 10 Vasta etendaĵo da akvo. Korpa organo. 11 Manĝaĵo. Himno gloranta Apolonon. 12 Plezurarbaro. Elektra fajrero. 13 Kuvo. Papilio. 14 Fritilo. Peco. 15 Rapide k nevole malsupreniri. Detranĉi herbon. 16 Korpa organo. Ĉiela nutraĵo. 17 Preparita felo. Glitveturilo.

ENIGMO N.º 22

Krucvorta enigmo, de J. Devis.

Sama figuro de antaŭaj numeroj.

Horizontale: 1 Juvelŝtono. (Inv) Musĉasanta mamulo. 2 (Plur) Zoologia speco kiel bovo, kapro, k. t. p. 3 Sufikso. Moviĝi denove de iu loko al alia. (Inv) Sufikso sen difinita senco. 4 (Rad) Tranĉi per dentrandi ilo. (Rad) Mara amfibio folhava mambesto. (Rad) Sovaĝa porko. 5 Senkolora. Spirebla gaso. 6 Interplektaĵo da vojoj. 7 Doni edzinan havaĵon. Montara remaĉbesto. 8 Labora. (Rad) Multe da fojoj. Pref. signifanta erare. 9 Pronomo. (Inv) Rilata al perioda komerca kunveno. Ĥemia simbolo de la tantalo. 10 (Rad) Maso el kunigitaj ne samspecaj partoj. 11 (Rad) Monato. (Rad) Pastobesto.

Vertikale: 1 (Rad) Skrapi. (Rad) Esprimi ŝuldan senton. 2 Tabeloj de deveno. 3 Sufikso. Malraspa. Interjekcio. 4 (Rad) Grandega kvanto da sala akvo. (Rad) Arbo. (Rad) Rabobirdo. 5 (Inv) Ŝlimo. Fari refalditan borderon ĉe tuko. 6 Ies historio. 7 (Inv) Tio, kion Dio faris el nenio. (Rad) Fosaĵo en tero por mortinto. 8 (Inv) Sufikso. (Rad) Maldika elasta langeto de hobojo. (Rad) Tre uzata forĝebla metalo. 9 Participa partikulo. (Inv) Rilata al iu sudamerika infuzaĵo. (Rad) Maceri takseblan planton en likvaĵo. 10 (Rad) Metata en riskoplana situacio. 11 Leĝoscienco. (Inv) Trinkvazo.

CURSOS DE ESPERANTO POR CORRESPONDENCIA

Forn, 19 MOYA (Barcelona)



LERNU TRADUKANTE

Inter la sendintoj de korektaj tradukoj ni distribuos premiojn, laŭ samaj kondiĉoj kiel por la enigmoj.

S-anoj V. Hernández Llusera, M. Ruiz Maza, L. Santamarina, A. Ma triles, A. Candela, R. Albero, M. Buscato, E. Pons, E. E. Yelland, V. Monsalve, S. Roca Rodó, M. Fernández Méndez kaj J. A. Daniel sendis al ni korektajn traŭlukojn de la tasko de Aprilo. Atingis 10 poentojn S-ano V. Monsalve kaj ni sendas al li la premion.

Ni prezentas la plej korektan tradukon:

Mia figuro, mia juneco, mia entuziasmo, mia soleco meze de nekonata lando, interesis al unu el miaj vojaĝkamaradoj en la vojo de Florenco al Romo, kaj li fine faris intiman amikecon kun mi. Sincera knabo, preskaŭ samaĝa ol mi, kiu estis, laŭŝajne, filo aŭ nevo de la fama kantisto David, la unua tenoro de la italaj teatroj, en tiu epoko. David ankaŭ vojaĝis kun ni. Li estis homo jam proksima al la maljuneco. Li sin direktis al Napolo, kun la celo kanti por la lasta fojo en la Teatro Sankta Karlo. David traktis min kun patra amo, kaj lia juna kunulo kovris min per zorgoj kaj ĝentilecoj, al kiuj mi respondis kun la naiveco kaj simpleco de mia aĝo. Ankoraŭ ni ne alvenis al Romo, kaj la knabo kaj mi jam konsideris nin nedisigeblaj. En tiu epoko la kurierveturilo ne bezonis malpli ol tri tagojn por iri de Florenco al Romo. En la gastejoj, mia nova amiko agis kiel mia interpretisto; ĉe la tablo li servis unue al mi; en la veturilo li cedis al mi ĉiam la plej bonan sidlokon, kaj kiam mi estis dormema, mi estis certa havi ĉiam lian ŝultron kiel kusenon sub mia kapo.

Kiel nova tasko jen peco de la romano de V. Blasco Ibáñez «En busca del Gran Kan»:

Fueron recibidos Luis de Torres y Rodrigo de Jerez lo mismo que dioses, corriendo a ellos hombres y mujeres para tocarlos con admiración y besarles manos y pies, como si fuesen venidos del cielo. Dábanles de comer lo que tenían, y los más honrados del

pueblo los llevaron al bohío principal, haciéndolos sentar en dos sillas de las suyas, mientras los demás se ponían en cuclillas en derredor de la pareja de blancos. Cuando salieron los hombres entraron las mujeres, sentándose de la misma manera luego de tocarlos para ver si eran de carne y hueso como los indios. Preguntaron los dos embajadores por el rey del país, y a pesar de los buenos oficios de un indio de los que venían en la armada y les servía de intérprete, nadie supo darles razón. Vieron algunos indígenas principales, que parecían gobernar a los otros, distinguiéndose de ellos por su mayor obesidad, pero ninguno de dichos personajes gordos, desnudos y pintarrajeados tenía la mejor semejanza con el omnipotente «rey de los reyes», señor del inmenso Imperio de China.

Unua Tutmonda Ekspozicio de E. K. I. K.
en Barcelona

Okazis Filatela kaj Esperanta Ekspozicio de E. K. I. K. (Esperantaĵojn Kolektanta Internacia Klubo) laŭ la organizado de la Filatela Sekcio de Hispana Esperanto-Federacio, en la ejo de la institucio «Pensia Kaso» de la kvartalo Horta (Barcelona). Samideanoj Evaristo Gil, E. Moreno Medrano, Eusenio Pons kaj la Delegito en Horta, J. Montfort, sindone kontribuis al ĝia sukceso. La Biblioteksalonon de tiu institucio ornamis diversfacetaj kolektajoj. La tuta kolekto, bele enkadrita, de la Esperantaj poŝtmarkoj, eĉ la kvar eldonitaj en Jugoslavio kaj Triesto okaze de la Universala Kongreso, per kvarobloj. Granda nombro da poŝtstampajoj pri la kongresoj de SAT, UEA, IKUE kaj ceteraj naciaj kongresoj, inkluzive la unikan konatan ekzempleron de la poŝtstampajo pri la Kataluna Kongreso okazinta en Manresa. 1936. Esperantaj glumarkoj en granda nombro, inter kiuj troviĝis ĉiuj eldonaĵoj pri la SAT-kongresoj, Migrantaj Kartoj kaj aliaj maloftaj majstre prezentitaj. Memore al tiu ekspozicio oni eldonis belajn Esperanto-glumarkojn kun jenaj tekstoj respektive: «1.^a Tutmonda Ekspozicio de E. K. I. K. 29-30 Majo 1955» kaj «1.^a Ekspozicio de la Filatela Fako de Hispana Esperanto-Federacio». Ambaŭ glumarkoj sur la sama folieto estas haveblaj kontraŭ unu respondkupono po du folioj, ĉe la jena adreso: Sección Filatélica de la Federación Española de Esperanto, Apartado 875, Barcelona.

LITERATURA KONKURSO DE HISPANA ESPERANTO - FEDERACIO

J U Ĝ O

Akorde kun la regularo, la subskribintoj, elektitaj kiel membroj de la komisiono por juĝi la verkojn prezentitajn al ĉi tiu konkurso, atente kaj zorge legis la verkojn ricevitaĵn. Ĉiu el la tri membroj de la komisiono aparte asignis al ĉiu verko la nombron da poentoj, kiujn ĝi meritis laŭ lia opinio. La Sekretario de la konkurso adiciis la poentojn asignitajn al ĉiu konkursaĵo. Tiel, en orda vico de pli ĝis malpli granda nombro, oni aljuĝis la premiojn kaj subpremiojn, por la diversaj branĉoj, laŭ klasifiko doninta jenan rezulton:

ORIGINALA POEZIO

Premio: Al la versaĵo MEDALO, de «Fervorulo».

Subpremio: Al la soneto IDEALO, de «Miozoto».

Konsiderante iliajn meritojn, oni premias per *Honora mencio* en *Diplomo* la du versaĵojn titolitajn MADRIGALO, de «666» kaj TIA, KIA, de «Verdiranto».

ORIGINALA PROZO

Premio: Al la legendo KANTO DE L' PERFIDO, de «Miozoto».

Subpremio: Al la rakonto BENATA ESTU ESPERANTO, de «Benata».

TRADUKA POEZIO

Premio: Al la poemo (el la hispana) TRAVIVAĴOJ DE CID, de «Iberiano».

Subpremio: Al la soneto (el la hispana) AL NAJTINGALO, de «Arbara najtingalo».

TRADUKA PROZO

Premio: Al la literatura fragmento (el la hispana) LA MILITESTRO DE LA RUGAJ MANOJ, de «Akileo».

Subpremio: Al la literatura fragmento (el la portugala) LA MANDARENO, de «Lilio».

La nomoj de la premiitaj aŭtoroj fariĝos publikaj dum la Literatura Festo, kiu okazos en la kadro de la 16-a Hispana Kongreso de Esperanto, en Gijón. La komisiono dankas la valoran kontribuon de ĉiuj konkursintoj kaj subskribas ĉi tiun akton, kiel ateston de sia harmonie plenumita komiso.

J. A. Saldanha Carreira
(Lisboa)

Mariano Soñá
(Tarrasa)

Luis Hernández
(Valencia)

el la paĝo 185

SANTA CRUZ DE TENERIFE. D-ro José Roberto Vivas, Ĝenerala Konsulo de Venezuelo en ĉi tiu urbo, vigla kaj entuziasma samideano veninta al niaj vicoj antaŭ ne longe, nun faras arangojn por okazigo de kurso en la insula ĉefurbo, kies preparaj kunvenoj jam komenceiĝis.

Plezure ni povas aldoni, ke ĵus li ricevis la distingigan honorigon, ke la Registaro de Venezuelo, laŭ ordono de la Prezidanto de la Respubliko kaj decido de la Ministro por Eksteraj Aferoj, nomis lin oficiala reprezentanto de Venezuelo ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Bolonjo. Ni sincere gratulas nian bravan samideanon, des pli, ke li atingis komision, kiun lia ŝtato faris la unuan fojon en la historio de Esperanto.

SAMA DE LANGREO. Radio Langreo dissendis 14/4 informojn pri Zamenhof, 12/5 pri Esperanto kaj Unesko, 26/5 pri Esperanto kaj turismo kaj 17/6 pri Esperanto kaj komerco. Ni dankas tiajn elsendojn al la klopodoj de nia fervora S-ano Sacramento Collado Llana, kiu tiom laboras por Esperanto en ĉi tiu urbo.

SAMIDEANA VIVO

La 2-an de pasinta Majo, 8-an de Marto Martin Vallés Pujol edziĝis kun Dolores Pont Bertrán, en Sabadell. Korajn gratulojn!

Kiel soldatojn oni destinis en la Afrikan Armeon la samideanojn de Sabadell: Vicente Mateu Nouvilas (adreso: Compañía Defensa Química, Melilla) kaj Pedro Mas Martínez (adreso: 6.º Grupo Regulares, Agrupación 3.ª, Campamento T. Zenin, Larache).

● Berlin valoras vojaĝon. Petu informojn ĉe Verkehrsamt Berlin, Berlin - Charlottenburg 2, Fasanenstr. 7-8.

● Agentejo de vojaĝoj en Hispanujo: *Viajes Marco*, Rambla del Centro n.º 27, Barcelona. Esperanto uzata.

● Ni interesiĝas pri malgrandaj artikoloj, desegnaĵoj, bildoj kaj priskriboj pri ĉiu urbo, regiono, lando ktp, pri esperantista vivo, junulara vivo, sporto, folkloro, labor-cirkonstancoj, kultura vivo, religia vivo, plezurokupoj ktp. La sendata materialo devas se eble esti aktuala, sed ĉiu povas do skribi pri la aferoj kiuj pli interesas lin. Al ĉiu kontribuinto, kiu sendos al ni deziratan materialon, ni kompensas per ia memoraĵo el nia lando. Esperanto-klubo Mara Vento, Postboks 132, Haugesund, Norvegujo.

● Hispana laboristo, specialisto en meblifarado, deziras labori eksterlande. Korespondos pri ĉi tiu afero S-ro J. Guzmán, Horchatería Jaime, Ruzafa 7, Valencia.

● «Esperantologio kaj Interna Ideo», folio monata de D-ro Gandi (77-jara), dumviva membro de U. E. A. Pago laŭvola. Adreso: D-ro Gandi, Alcobendas, Madrid.

BOLETIN de la

FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Adreso de la Redakcio kaj Federacio
Str. Pelayo, 7, 1.ª - VALENCIA

DONACOJ AL NIA BULTENO

Antaŭa sumo 882 pesetoj.

A. García Gómez, 10. — P. Naranjo, 5. —
F. Alsina, 20. — F. Buisán, 5. — J. Rufes, 10. —
A. Pont, 15. — M. Monleón, 10. — V. Perles, 40. —
D. Lloréns, 25. — M. Alamo, 10.

Entute 1032 pesetoj.

TUTE SENPAGE!

Estas denove akirebla, jam en dua nova eldono, la ilustrita faldfolio en Esperanto kun detala artikolo, verkita de Luis Hernandez, pri la urbo Valencia. Petu ĝin tuj per simpla poŝtkarto al

Sociedad Valenciana Fomento del Turismo
Bajos del Ayuntamiento VALENCIA

● Mi deziras korespondi kun gesamideanoj el Svedujo, Nederlando, Ĉinujo kaj Japanujo, preferinde studentoj pri kemiaj sciencoj aŭ lingvoj. Oni skribu en siaj naciaj lingvoj kaj esperanto. D. Herreros Bajo, Sicilia 270, 2.ª, 3.ª, Barcelona.

● ESPERANTOFONO estas la gramofona disko 45 r. p. m. per kiu vi povas lerni bone elparoli Esperanton. Elparolo de Prof. Dalmaŭ kaj de poeto Vilá. Prezo 100 pesetoj. Mendu tuj kun pago al BELPOST, Apartado 5164, Barcelona. Pago akceptata ankaŭ ĉe U. E. A., U. L. kaj Heroldo. Por eksterlando, prezo 1 sterlingo aŭ 1000 fr. frankoj aŭ 3 usonaj dolaroj. Atentu ke nur se bonsone eniras ĝi povas bonsone eliri.

ATENTU! ATENTU!! FINE APERIS JAM LA LIBRO, KIU NE MANKOS EN VIA BIBLIOTEKO LA MALPRUDENTA SCIVOLULO novelo el la fama verko «Don-Kiĥoto» de Cervantes, en klara bela fidela traduko de Luis Hernandez.

Bonkvalita papero. 68 paĝoj. 20 x 14 cm. Belaj ilustraĵoj kaj vinjetaĵoj. Arta kvinkolora surkovrilo. Tamen... malgraŭ tiel altaj kvalitoj, la prezo estas trege malalta: 20 pesetoj, inkluzive sendkostojn por interne de la lando. Jen do valora donaco por viaj korespondantoj.

Mendu rapide ĉe Libro-Servo de Hispana Esperanto-Federacio, Pelayo, 7, Valencia.

Speciala rabato por la grupoj kaj por mendoj superaj al dek ekzempleroj.

Eksterlandanoj, dezirantaj akiri ĉi tiun valoran pecon de la klasika hispana literaturo, estas petataj atendi informojn de siaj landaj libro-servoj. La prezo ankaŭ estos tre favora.